

	<h1 style="color: red;">PENSEO</h1>	<p style="color: red;"><i>N-ro 400</i> <i>feb. / 2025</i></p>
<p style="color: red;">Monata Beletra Revueto en Esperanto Honorita de Premio Grabowski, 1994</p>		
<p style="color: red;">Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 36-a jaro http://www.esplerno.cn/penseo/penlisto.htm</p>		

Varman gratulon al la publikiĝo de la 400-a numero de Penseo!

Veĵdo (Ĉinio)



Gloraj kvarcent paŝoj

omaĝe al la 400-a numero de Penseo

Kvazaŭ sur la kruta voj' al mont'
paŝ' post paŝo ni nin trenas pene.
Marŝas ni fervore, vigloplene,
spite al veprobara renkont'.

L' alta cel' videblas en la front'
verda stelo brilas al ni bene.
Ni des pli laboras entreprene,
brave antaŭeniras sen desaptont'.

Kvankam malfacilas la irado,
ni persistas en paŝad' senĉesa
por nia verda literatur'.

Penseoj pasintaj en parado
nin alvokas al iro progresata
plue al labor' por E-kultur'.

Ardo (Ĉinio)



Omaĝe al la kvarcenta numera Penseo

okaze de kvarcent-numera jubileo
de la literatura floreto Penseo

mi volas diri miajn korajn bondezirojn
kaj versi kun pasio arda la admirojn

ĝi ekburĝonis antaŭ tridek kvin jaroj
kaj kreskas neflekseble en penigaj jaroj
komence Sceto, Guozhu estis redaktoroj
kaj verkemuloj viglas en la kunlaboroj
post iom Veĵdo tenas torĉon de stafeto
li daŭre faras ĝin senpaga retgazeto
per redaktado, kompostado, kaj dissendo
li penlaboras ĉiutage eĉ sen plendo

poemoj, prozoj, kaj fekundaj ĝenroj ĉiaj
en ĝi aperas verkoj kun belstiloj siaj
jen ĉinaj klasikoj esperantigitaj
ankaŭ ĉineskaj *cioj** estas tradukitaj
kiuj mirigis la legantojn per abundo
malgraŭ ke ĝi kreskas en la malfekunda
grundo
ĝi eĉ aspektis kiel formo tre modesta
sed ĝia kolegaro estas tre honesta

honoris ĝin la Grabowski-premio
tio instigas verkemulojn en Ĉinio
por riĉigi la beletran florigardenon
novicoj verkas kaj tradukas do per peno
por konformiĝi al la reta evoluo
Penseo surretiĝis en ekspresa fluo
la paĝaranĝo belas kaj enhavo riĉas
al esperanto ĝi efike sin dediĉas

jen la numero kvarcent estos speciala
por ĝi ni ĉiam devas esti tre lojala

la suko kaj aromo de Penseo restu
 ĉe ni feliĉe bela muzo plu kunestu

Pensoj pri Nova jaro

novjaro venas
 kun io nova, en mi
 espero plenas.

saluton koran
 al mia kara, venu
 estonto ora!

en la memoro
 estas ĝoj' kaj amaro,
 kaj iom gloroj.

pli bonu ĉio
 por ni en nova jaro,
 do eblos io.

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



Ĉu alvenas la jaro serpenta?
 Ja kutimas mi en mia vivo
 al moviĝ' pli-malpli sendependa,
 ne rampado serpenta, sed drivo
 en la fluo de l' sorto-rivero,
 inter ravaj kaj mavaj eventoj
 kaj, dum restas mi plu sur la tero,
 ŝatus mi ke ne lasu min venkoj.

Nun, domaĝe, plenplenas la ter' da
 serpentaro venĝema, kruela,
 sed la jara serpent' estas verda, -
 eble l' mondon ĝi faros pli hela,
 pli feliĉa kaj pli bonespera
 nur kun floroj, sed ne kun urtikoj -
 tion el la animo sincera
 mi deziras al vi, geamikoj!

Min ne traktu kvazaŭ folan.
 Dum la viv', laŭ propra vol'
 amas pli mi la popolon
 ol min amas la popol'.

Se ĝi estas mia pek' do
 laŭ ordono de l' destin'
 punu min la malrespekto
 de amikoj, moku min
 plej proksima proksimulo,
 aludante al forpel',
 mi deklaru sen skrupulo:
 - Estas simpla bagatel'.

Sed se malsamideano
 min akuzas kun obstin',
 eble, mia amo vane
 enkadrigas ankaŭ lin.

Nu, ĉion ajn nun diru oni
 malantaŭ mia olda dorso,
 sed mi komencas fanfaroni
 nur en ebri' kaj kun rimorso,
 min admonanta pensi sobre
 eĉ en ne tute sobra stato.
 Alie, certe, falos sob re-
 levanta sin popola ŝato.

Volis stulta car' de
 lando aĉhumora
 muziki mocarte.
 Do en iu horo
 vokis li flutiston
 faman en la mondo
 por el ties buŝo
 venu la respondo.

Al demando lia
 la ruzul' kun fluto
 diris: - Moŝto via,
 tamen ĉu en tuto
 umis vi almenaŭ,
 eble... kun gitaro?

Kraĉis car': - Apenaŭ.
Car' mi, aŭ ne caro?!

Ekde la prapatroj
mi la landon regas,
kaj dezirojn carajn
dio mem ja flegas.
Do, kiom da mono
volas ci, fripono,
por instrui arte
min ludi mocarte?

La ruzul' gratetis
sian krispan nukon,
iom hezitetis:
- Estas certa truk' en
la instrua senco,
postulanta penon.
Mi por la komenco
instruu azenon.

Se azeno via
fluton ĉi ekludos,
Senprobleme vi ja
poste tion studos.
Pri l'honorario:
du sakoĵ da oro
estu deca pago
por mia laboro.

Ekde, – diris caro, -
vi kun mia beno.
Sed kiom da tempo
lernos la azeno?
La flutist' ŝultrumis:
- Dankon pro l'konsento,
sed tio dependas
de ĝia talento...

Ĉe mavhumoro min osced' ne
savas,
kaj lezas koro iom, sed ne
gravas.
Laŭ freŝa neĝo trotras mi al

mia
kvieta kaĝo. Diru, kial
tia
tavolo virta de la neĝo
pura
min faras vintra dum arpeĝo
kura
de la neĝeroj dum krepuska
flugo
en mian vivon, kie ĵus la
fluto
de sentoj ludis milde kaj kun
ben' eĉ?
Mi trans abioj vidas alkon,
ve, neĝ'
falanta ŝirmas beston belan
preskaŭ,
sed kornoj kvazaŭ en ĉielon
kreskas.

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



La holmo

Tiam estis mi ankoraŭ juna,
via kiso mian koron tuŝis.
Rendevue l' holm' tre oportuna,
sur gazono ni brakume kuŝis.

L' am' unua flagras ja dumvive,
l' afablec' neniel forgesebla.
Kie estas vi nun efektive?
sopirante mi suspiras febla.

Morne mi nun zumas elegie,
eksciante, ke vi ne plu estas.
Tristas mi profunde jam larmstrie,
sur la holmo mi denove nestas.

Vi nun ĉiam loĝas en l' edeno,
la keruboj gardas vin kun beno.



Rita Mkrťĉjan (Armenio)



Aŭtuna tag' sopiris koro,
Sencela voj' kondukis min,
Sub piedoj- flava foliaro
La pluv' senfina kaj la voj' sen fin'.

Sed, jen subite - la miraklo
La rozo pala en folia "mur",
Ĉu songo aŭ la miraĝo,
Aŭ de sorĉist' fabela tur'?

Sed kiel restis roz' mirinda
survoj', deŝiris ĝin neni',
- Ne nur la dornoj estas en la vivo,
La rozo flustris, kaj nenion pli.

Ni anoncu Tagon de Amikoj,
Ne, ne tagon, estu jaro, eĉ jardek',
Ni pardonu ĉiujn pro ofendoj niaj,
Malatent', perfido, aŭ pro la pek'.

Ni anoncu Tagon de Bonuloj,
Tagon de pontet' de kor' al kor',
De la vort' sincera, ago bela,
Ĉio kara restu en animo, en memor'.

Jarmiloj pasis. La idaro
mencias, citas, se parolas
"Sokrat' amiko estas mia,
Sed la veraĵo pli valoras".

Aĥ, revoj, revoj pri honesto,
Ne ĉiuj agi juste povas,
"Sokrat' amiko estas mia"
-Jen, nur ĉi-tio pli valoras.

Karesas aŭdon laŭdo dolĉa
Kaj vikle sonas voĉ' favora
"Sokrat' amiko estas mia",

Ĉu vero estas pli valora?

La vortoj ne atingas celon,
Silent' ne ĉiam estas oro
Pli ofte estas forgesite,
Ke vero estas pli valora.

Konkursas iu la fremdulo
Prezento brila, lin - ne konas
La konscienc' ne memorigas
Ke, la veraĵo pli valoras.

Ne ĉiam la talento gajnas
La voj' malofte verdkoloras
Se la Sokrato tiam sciuss,
Ke la veraĵ' plu ne valoras.

Sokrat, Platon, eĉ historio miksas,
Hezitas ni, ĉu ni memoras?

La amikeco estas grava,
"Sed, la veraĵo pli valoras!"

P.S. En ĉiuj sferoj de la vivo

Decidu, agu propravole
Por ĉiuj tempoj senc'
konstantas

"Veraĵo estas plej valora"!

Luiza Carol (Israelo)



Vero vivos

Svarmas malveroj en dikaj manlibroj
pri la nuntempo kaj pri historio.
Plenas ĵurnaloj je falsaj priskriboj
generacio post generacio.

Tro multaj homoj klaĉadas pri tio
kion ili neniam neniel ekkonis.
Tro multaj homoj konsilas pri ĉio
kvankam ili neniam neniel scipovis.

Plenas la mondo je aĉaj malveroj
disvastigataj pro homa nescio,

krom mensogaroj kaj mensogeroj
disvastigataj samkiel rabio.

Vortoj de vero perdiĝas en vento,
spurojn de vero la sablo forviŝas,
revoj pri vero fariĝas lamento
kiu dolore, korŝire fandiĝas.

Muĝas la voĉo de fikalumnio;
vero kaŝiĝas en nest' de l' silento.
Serĉi la veron fariĝas defio
pli kaj pli akra en nia jarcento.

Varman gratulon, ho, juna amiko
kiu aprezas la flustron de l' vero,
dum la malver', kiel falsa muziko
fie bruegas surdige sur tero.

Spite al ĉio la vero ne mortas,
ĉar ĝiaj semoj subgrunde ekdormas.
Mute, mirakle, la semoj kaŝiĝas
eĉ dum jarcentoj, sed poste vekigiĝas.

Ángel Arquillos (Hispanio)



Kial mi havas flugilojn?

Kial mi havas flugilojn?
Mi ne 'stas vera anĝelo,
ĉar mi havas karnajn kruojn
grandajn manojn kaj orelojn...
do,
flugilojn por kio?
Dum la dormo mi vojaĝas,
sed tute ne per flugiloj
mi flugas kiel senkorpa spirito
tra la senfina universo
ĉio...
okazas ĉiam
en mia komforta lito
kaj preskaŭ ĉiam dormanta.
Kaj mi kun granda ĉagreno
ja konstatas

ke sur mia dorso estas
paro da blankaj flugiloj,
sed ne karnaj
ili estas nevideblaj,
netuŝeblaj de la homoj,
ili estas nerealaj,
sed bedaŭrinde tro peza

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Preskaŭ poemo

Poemo silentas,
kiam la doloro de l' mondo
invadas la versojn
kaj la koron de l' poeto.

Poemo silentas,
sed rifuĝintaj vortoj,
inter la linioj de l' songo,
ekflugas sur flugiloj de l' poezio
por festi la Novjaron.

Juiz de Fora, 30/12/2024

Brazilio

Marzena Wawrziczko (Pollando)

arneo

sen manipulado alligiteco daŭras
al la surteraj plezuroj de mono kaj sekso
raketo en la spacon timoj presitaj
ĉeesto de iu alia dum meditado

kiam la radio kaj televido estis forĵetitaj
ili serĉas majstron kiu montros la vojon
ĉerpas sanktan energion el podkasto
la lasta generacio kaptas la ŝipon

ĉesu ruli la hologramo malklariĝas
la kalendaro rememoros la enkarneĝon de
Mitra
malhelaj lumaj tuneloj super vi
vi estas via propra guroo jupitero

de altflugitaj esoteraj konceptoj
 memplenumaj profetaĵoj
 ili kreas pensojn el retejoj
 kaj de dronaj vidoj en la ĉina ĉielo

postbildo

sen via energio la publiko malaperas
 detranĉi la finon de la piramidoj
 postlasitajn birdotimigilojn
 ne trompiĝu pri reciklado

ne estas profito al aliulaj planoj
 la fonaj spiritoj estas mortigitaj de la
 abunda parazito
 rigardante identigon
 ignorante tion kion vi ne plu estas

sentas senliman konscion
 emocio nutras puran enhavon
 neŭrala reto de novaj pensoj
 kreas rigardetojn de la templinio

civitana amo

mi ne legos la poemon
 kaj voku vian animon
 mi ja ne estas la unua
 kiu estas memori vin

mi ne citos strofojn
 ĉar vi ne havas manieron defendi vin
 agiti por batali
 mi ne bezonas verŝi larmojn

mi ne estos nigra kaj blanka
 fotoj kaj respublikoj reviviĝas
 memstaraj tekstoj
 absolvu viajn farojn

mi ne serĉos spurojn
 sur la stratoj de Toruń
 kaj aŭskultu la bardojn
 en muzikaj, funebraj kordoj

apenaŭ post la kvara movos lian manon

post mola kovrilo kaj la tago komenciĝos
 kun verda ekbrilo kaj pura felo
 lupu kuŝas kun vi

Nek li serĉis ilin, nek al kiuj vi transdonos
 rigardu atente hodiaŭ, ĝi povas esti utila
 ĉar tie ĝi estas inter la urbaj stratoj
 lupu kuras

la laboristoj mem estis prizorgataj
 restu ĉe ni, ĉar kien vi kuros?
 pro tio vi prudente servos al ni
 vintre survoje

de nun marŝas lupoj tra klaraj neĝoj
 la vojetoj kirliĝis de blanka polvo
 agante en la mallumaj kaj longaj noktoj
 diversaj ministerioj

kaj kiam la blanka jupo brilas
 la luma sinjorino meze de neĝoŝtormo
 ili brilas per okuloj, ili marŝas antaŭ ni
 veli anĝeloj

Nicolino Rossi (Italia)



Silvestra balado 2024

Silvestra nokto, jarofino,
 ĉie ĝojvervo, gajinklino,
 feliĉobril' ĉies destino,
 ĉampanoglasoj tintas bene...

La mondo ŝajnas cirka ludo,
 prospero, riĉo, plezurtrudo
 nin ĉiujn benas sen ekskludo,
 homsvarmoj festas laŭrefrene...

Ni mise vidas tra trompenso:
 konfliktaĵoj kun intenso
 preter rezono, saĝa penso,
 militoj regas suverene...

Silvestra nokto, baloj ĉie,
la festetoso false strasas,
ĉampano ŝaŭmas, ĝisebrie
ni vivproblemojn disfrakasas

en la esperon pri forgeso...
Vivuojn, ĝojon, vivprosperon
ĉiuj disklamas por sukceso,
kaj sanon, monon, amsinceron...

Sed la militoj morgaŭ pluos
kaj kruelaĵoj plu disfloros,
ni egoisme plu poluos,
pro niaj misoj plu doloros.

31decembro2024

Laimundas Abromas (Litovio)



Filino de Diablo

Similas strange ĉi fabelo l' veron,
Diablo vivis iam sur la Tero.
Delonge vidvis li. Kaj pri edzino
memore restis ŝiaj tri filinoj.
Ankoraŭ kvara estis, tre afabla.
Bedaŭre malfidelis kaj Diablo...
Nevera estis tiu ĉi fratino,
filino de Diablo kaj Feino...
Kaj pasis multaj jaroj... Belaj iĝis
filinoj de Diablo, maturiĝis.
Kadukis tamen patro kaj rigidis,
filinojn edzinigi li rapidis.
Plej aĝan li invitas al palaco,
al ŝi parolas ame, sen prefaco:
„Arogantecon, kiel doton karan,
al vi mi atribuas senavare
kaj edzon mi elektis“. Do, sen miro
edzino iĝis ŝi de l' oficiro.
Filinon duan li al si invitas,
senliman monavidon dote kvitas.
Kaj edzon trovis por filino riĉan.
La negocisto faros ŝin feliĉan.
Bonvole kaj filino tria venis.

Por ŝi la ekscitiĝon patro tenis.
Kaj edzon al filino tria donis,
poeton bluokulan li disponis.
Filino kvara aŭdis tion, spite
ŝi venis al la patro seninvite.
„Neniom dotos vin, - Diablo diras,-
kaj edzon mem vi trovu, se deziras.
Patrino vokis vin per kant' feliĉa,
do, iru sole vi tra l' mond' senriĉa“...
Vespiris ŝi kaj la okulojn fermis...
Subite sur la Tero l' nokto ĝermis.
Kortuŝis tio patron... Sen akلامo
li nomis ŝin per milda nomo Amo...
Kaj iris forpuŝita ŝi sen vortoj,
sentime, por renkonti sian sorton.
Pli forta restis ŝi ol l' mort', malbeno,
eterne juna, rava kaj bonvena.
Senvorte ŝin komprenis koro ĉiu,
konanta tiun senton kun pasio.

De tiam migras ŝi tra l' mondo tuta
kaj portas florojn, sunon kaj saluton.
Junece ŝi misteras kaj impetas,
aŭ kiel maro – ŝtormas kaj koketas.
Se foje ŝin ekkonos iu iam,
forgesos tiu ŝin neplu, nemiam.
Ĉu blonda estos ŝi aŭ nigrohara,
rideto ŝia iĝos ĉiam kara.
Konsolos iun milde ŝi, anĝele.
Alian ŝi turmentos, eĉ kruise.
Kaj nomos ŝin malsame ĉiuj homoj,
ĉar l' amo havas multajn, multajn nomojn.
Ĉu helos majo aŭ novembro mornos,
sed spite frapos ŝi al ĉiu pordo ,
kaj venos, kiel la impeta ondo,
alflugos pli silente ol la sonĝo.
Sendormos nokte ni, ĉar ŝin sopiros,
sufero pro la duboj koron ŝiros.
Destinis l' sort', ke Amon ni ekkonu,
pli frue-malpli frue, sen admono.
Ŝi venos invitita kaj senvoke,
neatendita tute, senprovoke.
Se Amon senpreferos iam iu,
por tuta vivo malfeliĉos tiu.

Kaj ne senkaŭze oni ja legendas,
ke amosenton mem Diablo sendas.

Eugene Khvalkov (Rusio)



Neeksplikeblaj aferoj, kiuj okazas,
Flugantaj koloroj, kiuj lumigas la nokton.
Misteraj potencoj, kiujn vi ne komprenas,
Sed la magio, kiun ili disvastigas, forlasas vin
en miro.

En ĉiu koro kuŝas semo de magio,
La potenco de magio, pri kiu ni songas.
Kun kuraĝo kaj amo, ni povas ekbruligi ĝin,
La magio ene, kiu revivigas nin.

En la sunlumo, tra la foliaro,
En la pluvo kiun dancas sur la fenestro,
En la susuro de la vento tra la arboj,
Kaŝas la magio, ofte nevidita.

En ĉiu rideto, ĉiu brakumado, ĉiu tuŝo,
En ĉiu momento de ĝojo, amo kaj konsolo,
Ni spertas la magion kiu ĉirkaŭas nin,
Se ni nur malfermas niajn okulojn kaj
perceptas ĝin.

Kun bastonoj de magio kaj vortoj kiel flustroj,
Ili paŝas sur la scenejo, teksante ombrojn kaj
nebulojn,
Ili igas stelojn danci kaj kolorojn flori,
Kaj vekas songojn per radiaj gestoj.

Ilia arto estas danco de iluzioj,
Reflekto de sopiro kaj fantazio,
Ili kondukas nin al mondoj kiuj nur ekzistas
en songoj,
Kaj ni lasas nin senti la magion por momento.

En malnovaj skribaĵoj, skribita per inko,
Kaŝas la magio de la mondo, kovrita.
La flustro de la paĝoj, melodio de vortoj,

Rakontas rakontojn pri sorĉistoj kaj feoj.

Kun ĉiu turniĝo, malfermiĝas la potenco,
Kiu kondukas nin al malproksimaj landoj kaj
sorĉitaj regno,
Ni fariĝas herooj, sorĉistoj, esploristoj,
Kaj lasas la magion vekigi en ni.

Alte en la ĉielo, brilante kaj brilanta,
La steloj kaŝas la sekretojn de la mondo,
Ilia magio flustras en la silento de la nokto,
Kaj rakontas rakontojn pri amo, morto kaj
renaskiĝo.

Kun ĉiu rigardo al la stela ĉielo,
Ni sentas la senfinecon kaj la potencon,
Kiu ripozas en ĉiu stelo kaj inspiras nin,
Rekonas la magion de vivo kaj la universo.

Manel Sales (Hispanio)



Ne plu memori...

Momento pasema,
kiel eĥo de forgeso,
senkompate rivelas,
ke mi perdiĝas,
kiam mi ne plu memoras.

Viaj ridetoj,
nun silentaj fantomoj,
ne plu vizitas mian penson.
Mi malĝojas,
ne ĉar mi perdis vin,
sed ĉar mi jam ne rekonas vin.

Venis nova rigardo,
lumbrilo en la okuloj,
revivigas kaŝitajn sentojn,
kaŝtrezorojn en la polvaj tirkesto
de mia menso.

Sed, kompatinda mi,
la rido de la plej juna filo
plenigas min per dolĉamara ĝojo:
la lumo de lia rideto
ŝtelis la memoron pri la plej aĝa.

Ni komencas

Ni komencas fermi fenestrojn,
dum la lumo vanuiĝas.
La lesivado, duonpreparita,
atendante ene de la domo.

Grizaj nuboj, fadenoj de vento,
trikas vestaĵojn de trankvilo;
kaj la birdoj, kun nesecaj flugiloj,
ŝvebas proksime al la tegmento.

Ni komencas fermi fenestrojn,
jam ni estas envolvitaj de vespero,
ni komencas enhejmigi nin
kiel suspiron kiu portas silenton.

Vojoj de lumetoj

Vojoj de malgrandaj lumetoj
ĉirkaŭantaj la vesperan murmuron,
kie tuj svagiĝas ilia spuro,
ili skizas nekonsekvencajn vojojn.

La suno tra velura ombro,
dormanta post la matena memoro,
malantaŭe lasis radiojn siajn,
kaj flustras promesojn silentajn.

El la nokto devenas, la sopiro,
kiel kara, malnova amiko,
kun okuloj plenaj je demandoj,
rigardante la etajn lumetojn.

Mil steloj brilas en la ĉielo

Mil steloj brilas supre,
songoj kvietas malsupre.
En malluma nokto, kiel flamoj,
rakontanta pri sekretaj planoj.
Unu dancas, alia ripozas,

kaŝas en eterne, mi supozas.
Kune ili brilantaj, kune vivas,
sekretoj de nokto diras.

Brilanta tra la nokta vento,
portanta songojn en silento.
Mil deziroj, mil esperoj, senfina,
magio de nokto, neniam fina.
Ĉiu stelo estas rakonto,
flugas longe en la tempo.
Mil steloj en la ĉielo, mil vojoj,
eterna pasinteco vivas en revoj.

Jadranka Miric (Serbio)



Avo Frosto

Sur norda cerva glitveturilo Avo Frosto
alvenis frumatene,
forte tenante sin por boaca vosto,
faronta ĉion volonte senpene.
Je la dek dua magio ekis
ĉe la urba staĝo staris Li
donacante pakaĵojn al infanar' tie ĉi
kiu pacience atendanta lin. Inter ili estis vi.
Infanaro ĝoje reciprokis saluton
kantante kaj aplaude.
Iuj vigle dancis, iuj ĝoje ludis
dum koloritaj balonoj alten flugis.

La unua tago de Kristnasko

La unua tago
fariĝas granda familia festomanĝo.
Ekas ĝi tuj post Novjar'.
Ĝin simbolas la kverka branĉar'.
Ĝi montras homan solidarecon,
homan noblecon kaj spiritan
maturecon.
Tial ni ĝoje kantas "Aleluja" la odon al
Savanto nia!.
Nebulo falis malrapide
sed dense kovrante la urbon,
kvazaŭ falis blanka aranea reto
sur la tutan urbeton.

Je la dekdua aperis suno.
 La ĉielo iĝis klara. Ekestis lumo...
 “Jesuo naskiĝis” homoj jubilis.
 “Vere li naskiĝis” la respondon eĥis.

Se venos malbono

Skribu poemon por mi,
 mia ŝafido tenera. Kara ci
 tuŝu animon bonvortojn uzante
 malpermesu ke nia temp' pasas vante,
 nek en la kor' nestiĝu vintra spiro.
 Aldonu iomete da vortoj de amomagio.
 Enplektu herbodoron en mia harar'
 por ke al vento ekflirtu ĝi kune kun via
 ŝalo kiel par'.
 Ne atendu ke neĝo teron kovros,
 ĉar eĉ tiam, sub neĝtavolo, oni floron
 trovos.

Erika Godó (Hungario)



La jaro de la serpento

La jaro de la serpento venis kviete,
 serpento rampas sur la tero silente.
 Kaŝantaj sekretojn, ĝi alportas saĝon,
 malfermante novan vojon kun ĉiu paŝo.
 La okuloj de la serpento vidas ĉion,
 malkaŝante kaŝitajn verojn, nenion.
 Antaŭeniranta malrapide, sed certe,
 kondukanta sur la vojo de vivo lerte.
 Instruante nin aŭskulti internajn sentojn,
 kion ĝi flustras al ni en ĉiuj momentojn.
 Alporante pacienco, kompromiso en ŝanĝo,
 donaco de la jaro de serpento estas kiel
 sonĝo.

Karnavalo

Dum Karnavalo, ni vestas nin bele,
 en buntaj vestaĵoj, ni dancas hele.
 Vizaĝoj kaŝitas sub maskoj koloraj,
 plumoj belas, kostumoj orkoloras.
 La odoro de benkoj, dolĉe en la vento,

infana rido aŭdiĝas, plena de sento.
 En balo ni dancas, ritmo nin gvidas,
 feliĉon kaj ĝojon en koroj ni vidas.
 Vintro adiaŭas, printempo venas,
 la magio de karnavalo en ni restas.
 Feliĉaj memoroj, revoj tiel klaras,
 dum karnavalo, malĝojoj estas raraj.



Larmoj

Larmoj fluas el la koroj,
 kun dolor' kaj ĝoj' en gutoj.
 Sekretoj sin kaŝas en la animo,
 mesaĝ' parolas sen vortoj.
 Niu verŝigas larmojn, kiam ni malĝojas,
 ni ploradas, kiam ni ĝojas.
 Larmoj purigas la animon,
 kiel pluv' sur vojo, sen fiero.
 Foje laŭte, foje silente,
 larmoj falas, ni malpeziĝas.
 Ĉar la plorĝemo estas ĉio,
 kiel pluveto falas, sen fino.

La mondo de vortoj estas senlima

Kun ĉiu vorto elparolita,
 la mondo vasta ŝanĝiĝas.
 Libere, feliĉe imago ŝvebas,
 sen flugiloj, alte flugas.
 De lumo ĝis ombro, profundo,
 sen limo al la esprimo.
 Ĉiuj pensoj inspiras nin,
 vortoj kreas revojn.
 Poezio fluas klare,
 kiel akvo en la maro.
 Vortoj estas magiaj,
 kunigante korojn, feliĉe.

Memoroj maldormantaj


Leviĝas la lumo de tagiĝo,
 kiu karesas mian vizaĝon.

Ĝi venas tra nebulo,
 el sonĝoj, kiel mesaĝo.
 Ni revas pri tempoj forpasintaj,
 kiuj similas stelojn en ĉielo vasta.
 Malnovaj bildoj, memoroj,
 antaŭ longe forgesitaj vortoj,
 ridetoj, larmoj, kanzonoj,
 danco de memoroj, frazoj.
 Estas mesaĝo de pasinteco,
 kiu silente flustras rakonton.
 Sed en la lumo de tago,
 ili restas kaŝitaj en koro.
 En ĉiu tagiĝo frustranta,
 memoroj maldormantas.

La kiso de la muzo

La kiso de la muzo,
 dolĉa kiel la roso.
 Inspiron ĝi alportas,
 kiel birdoj alte flugas.
 Mian animon ĝi vekas,
 poeto mi fariĝas.
 La tuŝo de la muzo,
 estas granda sorĉo.
 Pensoj flugigas alton,
 helpas mian verkon.
 Nun vivas mia poezio,
 kiel herooj en la mondo.

Elena Popova (Bulgario)



Pasvorto *“fantazio”*

Vintre, dum ĉiuj dormis, la Tero ekbrilis blanke. Ĉu iu helpas al ĝi? Ivo miris, apogante sian nazon al la fenestro. Neatendite li aŭdis voĉon: "Mi, la Norda Vento, estas ĝia helpanto. Kia vintro estos, se ĝi ne estos malvarma kaj blanka." La vento ĵetis neĝon al la fenestro kaj forflugis, fajfante. Ĉu tio ne estis invito por ludi? Certe, la vintra vento estas juna kaj povas serĉi amikoj.

Vespere la vento dormis ie, kaj matene la tero, la domoj, la arboj estis eĉ pli nerekonoblaj. La infanoj

iris eksteren kaj eklaboris. Baldaŭ Neĝulo staris sur la neĝo. Ili rigardis la nazon de la karoto, kaj diris al ĝi, ke ĝi ne metu sian nazon en la fremdan lokon. Ili eĉ metis balailon en ĝiajn manojn, por ke ĝi estu laborema. Ĉi tiu blanka kaj malvarma "homo" havis ĉion, sed ĝi ŝajnis iom brovsulkita. Ili metis al ĝi ĉapelon kaj koltukon. Ilia "Homo" fariĝis bela - la infanoj rigardis ĝin kontente kaj ludis apude dum ili estis invititaj hejme.

Dum la nokto Ivo parolis kun ĝi. Li ne sciis, ĉu tio estas sonĝo, sed ĉio estis tiel reala.

- Dankon, knabo, ke vi kreis min! La luno diris al mi, ke mi estas la plej bela el ĉiuj neĝuloj, kiujn ĝi vidis. Vi pravis, estas io pri kio mi malkontentas. Mi ne volas ĉi tiun balailon! Ne ke mi hontas, sed... Metu al mi lernejan sakon.

- Nu, jen la plej stranga deziro, kiun mi iam aŭdis - lernanto - neĝulo. Vi ne povas moviĝi, kiel vi iras al lernejo?

- Kun la sako mi diferencigos de la aliaj.

- Jes, mi komprenas, vi volas aspekti kiel lernanto, kvankam...

- Knabo, vi ne lasis min fini - ne nur mi aspektos, sed mi estos lernanto. La vento diris, ke ĝi rakontos al mi ĉiujn lecionojn, ĉar ĝi kviete eniris la klasĉambrojn ĉiutage kaj aŭdis ĉion. Mi memoros. Mi ankaŭ parolis kun la Luno, ĝi amas min kaj rakontos al mi pri tio, kion la Vento ne scias...

La sekvan tagon la infanoj plenumis la deziron de la Neĝulo.

- Ĉu vi volas, ke ni nomu ĝin Zvezdin? Nia "Homo" estas vere bela - Ivo demandis siajn kamaradojn.

- Bone, Ĝi estas la unua revulo el neĝaj steloj - diris iu.

Zvezdin ridetis, lumigita de la Luno, ĝi aspektis tre kontenta. Iliaj konversacioj daŭris. Kiaj ili estis? Kiu volas scii, la pasvorto estas "Fantazio".

Promenado

Iun dimanĉon matene dum januaro, mi iris promenadi al la arbaro. Ne estis multaj homoj en la buso. La viroj signifoplene rigardis min, sed mi ŝajnis ne rimarki.

La tero ankoraŭ estis frostigita. Mi marŝis malpeze, sed miaj ŝuoj ĉirkaŭrigardis, ili ne konis la vojon, ili paŝis necerte, sed mi aŭdis certajn paŝojn. Miaj ŝuoj retropaŝis kaj faris vojon.

- Saluton, diris la viro, liaj okuloj bonvole ridetis. Mi respondis kaj pensis: "Li estas bona homo, la malbonaj homoj ne estas turistoj."

Mi rigardis lin - blankan ĉapelon kaj blankan koltukon ĉirkaŭ lia kolo, mi memoris pri la Eta Princo de Exupery...

La viro turniĝis, kvazaŭ li sentis miajn pensojn, rigardis min kaj diris: - Ne estas por virino ĉi-vojo, ĝi estas longa, sed post kiam vi estos survoje, estu kuraĝa!

Mi marŝis. La suno varmigis la arbaron. Ĉe la vojo, la bluaj okuloj de iu floro rigardis min el inter la foliaro, eta sed kuraĝa.

Mi daŭrigis. La varmiganta arbaro elspiris vaporon, odoris de putraj folioj, sed ankaŭ en ion verdaĵon. La arboj staris kvazaŭ kun funebrantaj vestaĵoj, profunde dormantaj. Pecetoj de la vintra donaco restis tie kaj jen, sed ĝi, la Vintro, estis avara.

Mi malvarmigis en ĉi tiu malĝoja kaj dormema arbaro.

Kuniklo elsaltis, li certe aŭdis la paŝojn de ĉasistoj. Mi mense diris al li: "Kuru, Kuniklo!"

La suno rigardis malsupren kun rideto, karesis min, kaj ŝajnis al mi, ke mi aŭdis: "Ĉiu havas sian propran vojon kaj devas ĝin marŝi!"

Tiel la tempo pasis nerimarkite kaj la vojo, kiun mi konkeris, kondukis min al la bushaltejo. Mi alparolis:

- Adiaŭ freŝa aero, dankon, arboj kaj arbustoj, dankon, vojo! Mi esperas protekti vin!

Kun kiu mi parolis? Ĉu ĉi tiu mirinda promenado estis sonĝo aŭ realo? Mi estis sola kun mi mem, kun miaj sentoj kaj pensoj, de kiuj mi ne povis eskapi. Nun mi sentas min tiel trankvila!...

Yohanes Manhitu (Indonezio)



Paperfloroj

Beleco troviĝas en ĉiu loko,
troviĝas ankaŭ en paperfloroj

faritaj per ambaŭ manoj
imitante naturajn florojn.

Beleco ankaŭ troviĝas en falsaĵoj.
Se ni malkonas kio estas originala,
hodiaŭ aŭ iam en la estonteco,
malvero aspektos nature.

Hans-Georg Kaiser (Germanio)



Blua birdo

Birdo blua
flugas alte
kaj senbrue
sving-ekzalte.

Kia ĝuo
flugi kune
kun la birdo
kaj subsune.

Florebrioj
Elizeaj,
kompreneblas
ĝojoj viaj!

Konduti blue

Simple konduti blue.
Hodiaŭ konduti blue
kaj morgaŭ konduti blue
kaj postmorgaŭ eventuale blusblue.

Pluki la bluan floron.
Je la blua horo meti ĝin
postorelen kaj lasi flui la Bluan
Maron
en la bankuvon
sur la bluajn ĵinzojn,
kiuj ankoraŭ ne estas uzitaj.

Trinketi volupte "Delton de Venuso"
kun blua kuracao, ginsenglikvoro,

blanka rumo kaj dolĉa kremo.
Pro ĝi bluiĝi.

Tra la malfermita fenestro
rigardi la bluan ĉielon.
Kaj jen ĝi jam flugas,
la unua hirundo
el papero tra
la blua banĉambro.

De kie venas vi?
El Turkio aŭ el Ŝlaraflando?
Kion vi jam celas ĉi tie?
Tiajn frenezajn ideojn
havas kutime nur mi.

Sed mi estas sufiĉe blu-ebria,
kuŝas en blueta bankuvo kaj
meditas pri karpoj bluaj,
pri la reĝinoj de bluaj noktoj,
pri mortaj bluaj lipoj kaj
la bluecajn fruntsulkojn de
uletoj.

Tial mi malaperas rapide
en bluan orientan sonĝon
kaj atendas, ke bluema revohomo
eksentu mian mankon.

CHOI Namseon¹

De maro al knabo

1

Ĉo.....lsok ĉo.....lsok ĉok ŝŭa.....a².
Mi batas, disrompas kaj fordetruas.
Alta monto kiel Taj³, roko kiel la tuta domo,
kio do ĉi tio, kio ĉi tio?
Demandante tondre, ĉu la fortegon mian scias
vi aŭ ne,
mi batas, disrompas kaj fordetruas.
Ĉo.....lsok ĉo.....lsok ĉok tjurrung kŭak.
2
Ĉo.....lsok ĉo.....lsok ĉok ŝŭa.....a.
Mi tute ne havas timon pri ajno.

Kiu havas plej grandajn forton kaj
regpotencon sur tero,
ne povas moviĝi eĉ li antaŭ mi.
Sian forton ne povas al mi uzi eĉ la aĵo plej
granda.

Ja al mi, ja al mi, ĝuste antaŭ mi.
Ĉo.....lsok ĉo.....lsok ĉok tjurrung kŭak.

3

Ĉo.....lsok ĉo.....lsok ĉok ŝŭa.....a.
Se ulo neriverencinta al mi
ĝis nun estas ankoraŭ, anonciĝu kaj
elmontriĝu.

Qin Shi Huang⁴, Napaljun⁵, ĉu li estas vi?
Kiu, kiu, kiu do? Submetiĝos certe ankaŭ vi al
mi.

Se estas konkurul' kun mi, tuj venu.
Ĉo.....lsok ĉo.....lsok ĉok tjurrung kŭak.

4

Ĉo.....lsok ĉo.....lsok ĉok ŝŭa.....a.
Kiu kun apogo sur montangulet',
aŭ kun milegrajno da insulo kaj manplato da
ter'

ene de l' loko sin ŝajnigas grava
kaj fiere sin sola konsideras tre sankta,
venu li ĉi tien kaj min rigardu.
Ĉo.....lsok ĉo.....lsok ĉok tjurrung kŭak.

5

Ĉo.....lsok ĉo.....lsok ĉok ŝŭa.....a.
Jen estas unu por mia parulo –
tiu blua ĉiel' pro granda, longa kaj vasta
kovro.

Ĝi estas sendube sama kiel ni.
Disputeto, batalo, ĉiuspeca malpuraĵo ne estas.
Samkiel tiu hom' en tia mondo,
Ĉo.....lsok ĉo.....lsok ĉok tjurrung kŭak.

6

Ĉo.....lsok ĉo.....lsok ĉok ŝŭa.....a.
malamas mi tiujn mondon kaj homon,
tamen estas el ili sola aĵo aminda por mi.
Kuraĝa kaj pura knabaro juna
belkonduite tre ĉarme venas kaj sin premas sur
mian sinon.

Ho, venu, knabaro! kaj vin mi kisas.
Ĉo.....lsok ĉo.....lsok ĉok tjurrung kŭak.

notoj:

1. *CHOE Namseon (1890-1957): historiisto, poeto, eldonisto.*
2. *Ĉolsok ĉolsok: korea onomatopeo, imitanta plaŭdon sur rokoj.*
3. *Monto troviĝanta en la ĉina provinco Shandong.*
4. *Qin Shi Huang: Qin Shihungdi (259-210 a.K.), la fondinto de la ĉina dinastio Qin.*
5. *Napaljun: Napoleono Bonaparte (1769-1821).*

Esperantigis

**Chojus Europe****(Koreio)****El la ĉina antikva poezio****Yuan Haowen (1190-1257)*****Drasta pluvo frapas novajn lotusojn***—laŭ melodio *Minora sankta muziko*

1.

Folioj verdaj ĵetas densan ombron,
vidiĝas pavilonoj sur la lago,
ĉi tie regas friska la aero.
La granatuj' ekfloras kun aromatako,
en la prosper' de flora ruĝo.
Hirund' kaj ĝiaj idoj flugas kun leĝera
grako,
cikadoj laŭte ĉirpas sur salikoj altaj.
Dum drasta pluvo
pluvperloj ja disverŝas en ĥaos' per frapo
sur novajn la lotusfoliojn kun bat-krako.

2.

La homa vivo daŭras efemere.
Ne lasu bonan tempon
kaj belan pejzaĝon forflugi ŝtele!
Malbona sorto nia estas destinita
jam en antaŭa vivo vere,
ne penu per plenforto vane.
Plibone kantu ĉagrenpele
kaj drinku ĝoje kun amikoj
ĝis ebriiĝo jen prefere.
Ignoru kiel lun' kaj sun' alternas
navede kaj libere.

***Translogiĝo al la orienta korto de
patrinflanka familio***—laŭ melodio *Rondiĝo de luno kaj homoj*

1.

Montoj kaj montoj baras la urb-bruon
de nia vilaĝeto kun rikolto bona.
Mi translogiĝis kaj jam tie min fiksas.
Tra la fenestr' vidiĝas la montar' impona
kaj post la domo kreskas densaj pinoj.
Mi donos kampojn kaj arbaron en futuro
al miaj idoj malgraŭ mia peno.
Mi zorgas nur pri l' luno en brilpuro
kaj friska vento, kiu min karesas,
kiam mi ebriiĝas en plezuro.

2.

En l' reĝa templo staras mil persikaj arboj,
sed la falintaj floroj jam senspuris en
roj-flu'.

Ne volu koni ĉu la fluo klaras aŭ ne,
ĉu tie venas bovoj aŭ ĉevaloj kun voĉbru'.
Kiam Xie, l' general' de l'

Orient-Jin-dinastio
revenis al la hejmloko en bonfart' ne plu,
ve, lia nev' abunde larmis ĉe pereo lia.
Mi jam forgesis tion en ebria ĝu'.
De antikvec' ĝis nun la sento samas:
eĉ se vi loĝas jen en luksa la konstru',
post mort' neeviteble viaj ostoj
enteriĝis en dezerta monto, ĉu?

Yang Guo (1195-1269)***Lotussem-kolektantino***—laŭ melodio *Ruĝa persikfloro*

1.

Super l' urbo pendas nebulfumo
kaj malklaras akvo de l' rivero.
Belulino zumas kanton en boato.
Ofte mi memoras, ke ni kun sincero
renkontiĝis ĉe la silk-lava lago.
Inter ni nun staras la tri-laga sfero,
mi rigardas sopireme vane al la ĉielo.
La belino diras kun rideto tra l' aero:

“Ni similas al lotus-rizomo, kiu povas
ja rompiĝi, sed nin ligas ĝiaj fibroj sen
ŝancelo.

2.

Post kolektad' de lotussemoj
ŝi remas boateton en vesper'.
Helverda jupo ŝia krispiĝas en venta pel'.
Muziko biva tiras larmojn el
okuloj ŝiaj pro sopiroal reveno
de ŝia edzo el la foro.
Jam lotusfloroj fadas ĝis koloro
malhela, sed el li mesaĝet' nenia
atingas ŝin kun maltrankvila koro.
Rigardas ŝi al la malvarma ĉiel':
ambirdoj ruĝaj kaj ardeoj blankaj
jen pare flugas en krepusk-hel'.

Elĉinigi **Vejdo (Ĉinio)**

Ĉineske

Yi Qiao (ĉino en Germanio)

Medito pri homvivo

-- laŭ ĉinesko *Belulino Yu**

I.

Jen bildo en spegulo,
ho ve aĝulo.
Juneco delonge for,
mi meditas kun bunta memor'.

Jen la vespera suno,
sekve de l' luno.
Kun graco de l' univers',
lumas beno ĉiam en dispers'.

II.

La vesperruĝo belas,
krepusko helas.
Jen subiranta la sun',
sekvatas de l' leviĝanta l' lun'.

Nun steloj supre brilas,
ĉiel' trankvilas.

Kun l' eterna dia am',
senĉese viglas homviva flam'.

**Belulino Yu (ĉine: yumeiren): ĉina fikforma poemo
el du strofoj kun po kvar versoj de 7,5; 7,9; / 7,5; 7,9;
silaboj kun para rimo.*

Jadranka Miric (Serbio)

La unua neĝo

-- laŭ ĉinesko Sopir'-al-sudo*

Noktiĝis
Surĉiele lun'
salutas nin. Ankoraŭ
stelar' videblas ni kun
ĵus vaganta lun'.

Vintra nokt'
la unua. Vent'
kaŝis sin en kavego.
Mildas la beata sent',
la vivo senpent'.

Kristanoj
festas Kristnaskon,
naskiĝon, de ĉi monda
savanto, Jesuon Kriston.
Agrablan feston!

En la mond'
ekestu paco!
Ekdormu militistoj!
For el la vivo fi-laco.
Antaŭen, Aco**.

Matena
nebula grizec'.
Anstataŭ suno ekneĝis.
Jen, ĉarma neĝa belec'.
Sorĉa tenerec'.

**Sopir-al-sudo (ĉine: yijiangnan): ĉina fikforma
poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo
xa,xa,a (x=senrima).*

***Aco - la mallongigita serba nomo de
Aleksandar*

